ESPERANTO
MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ
INFORMILO 9
SEPTEMBRO 2019 Kol. 413/35

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: La 104-a UK en Lahti, La sveda ministrino salutis la kongreson Esperante, La E-konferenco IEK, Nevidebla transfuzo, La tragedio de R. Těsnohlídek. La renkontiĝo en Pardubice, Trista informo

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

La 104-a UNIVERSALA-KONGRESO
20. 7. - 27. 7. 2019

Ĝi okazis en Finnlando en Lahtio, en ne tre granda urbo, ĉirkaŭata de bela naturo, kiu famas pri vintraj sportoj. Ne pretervideblaj estas la tri skisaltejoj apud la sporthalo *ISKU AREENA*, kie la teamo *Pelicans* (Pelikanoj) trejnas sin kaj ludas glacihokeon. Tie okazis ankaŭ la ĉi-jara 104-a Esperanto-kongreso. Verdire, la elekto de sporta stadiono por la UK ne konvenas. La salonoj (aŭ pli bone kameroj) estas tre malgrandaj, pluraj ŝtuparoj sen lifto kaj altaj ŝtupoj en la stadiono ne estas adekvataj por nejunaj personoj, da kiuj tamen en la UK-oj estas plimultaj. Bonŝance ne okazis akcidentoj. Avantaĝo estis, ke ni bone vidis la podianojn kaj ni povis enrigardi malantaŭ la

kulisojn de la sportejo. Konvena estis *Salpus*, kie troviĝis ankaŭ la dua manĝejo. La manĝoj estis bongustaj.

Finnlando estas lando de "Mil kaj unu lago, betuloj, saŭnoj”. En vastaj arbaroj promenas boacoj kaj abundas fungoj; en lagoj naĝas fiŝoj.
Al la kongreso aliĝis 917 geesperantistoj el 57 landoj. La programo, kiel kutime, estis ampleksa kaj varia. Krom la kutimaj kongres-programeroj (Movada foiro, Kleriga lundo, Tago de lernado, E-kursoj, KER-ekzamenoj, IKU-AIS sesioj, Belartaj konkursoj, Urba akcepto, Esperantologia konferenco, Aŭkcio ktp.) la ĉeestantoj povis akiri praktikojn en aikido, eŭritmio kaj tajĝiĉŭano, sciojn pri biero kaj sano, ekzercojn pri kapdolora masaĝo, informojn pri diversaj religioj: Oomoto, Budhismo, Spiritismo, Ŭonbulismo, Katolikismo. Ne Di-kredantoj interesiĝis pri Ateismo.

La finnlanda gazetaro abunde informis pri la UK antaŭ la kongreso, kaj dum la semajna aranĝo okazis intervjuoj. Ĉiutage aperadis kongresa kuriero “La Saltejo", per kiu ni povis ekscii pri diversaj programŝanĝoj, manĝmenuo, kaj aliaj aktualaĵoj. Ekzemple: ampleksan informon pri la ĵus pasinta ILEI-kongreso en Serbio, pri ĝiaj rezolucio kaj aktivado rivelis Mireille Grosjean.
La kongresa ĉeftemo estis: "Vivanta naturo, floranta kulturo", kiu estis abunde pritraktata. Pri Finnlando okazis multaj programeroj. Oni parolis pri ekesto de la lando, pri la

demokratio, estis prezentitaj sameaj minoritataj lingvoj, eblis lerni la finnan lingvon eksprese, okazis kelkaj laŭtemaj ekskursoj. Prelegoj temis pri "Finna naturo", pri "Eduksistemo" kaj pri "Politika vivo en Finnlando". Oni parolis pri Esperanto-historio de Lahtio. Nacia vespero okazis en belega teatro. En la bankedo oni gustumis finnajn specialaĵojn.

Okazis pluraj posttagmezaj artaj programeroj, en kiuj prezentiĝis diversaj kantistoj kaj muzikgrupoj. Ni spektis koncertojn de Manŭel, Martin Wiese kaj de Ĵele. Vespere plezurigis nin la kantgrupoj Sepa kaj Asorti, Kajto kaj JoMo. Impresis la teatraĵo "Vivo de Galileo" prezentata de Saŝa Pilipović, kiu ankaŭ kantis ciganajn kantojn. La Litova grupo Asorti muzikis ankaŭ dum la balo.

Estis elektita nova estraro. Duncan Charters, el Usono, elektiĝis prezidanto. Vicprezidantoj estas: Fernando Maia el Brazilo kaj Huang Yinbao (Trezoro) el Ĉinio. Ĝenerala sekretario Alex Kadar el Francio. Kongresojn, kulturon, eldonadon, terminologion prizorgis Orlando Raola el Usono. Pri Afriko kaj Aktivula Maturigo okupiĝis Jérémie Sabiyumva el Burundo, pri Azio kaj Oceanio So Jinsu el Koreio kaj la sciencan kaj fakan agadon prizorgis Amri Wandel el Israelo. Akademianoj elektis novan sekretarion - François Lo Jacomo el Francio.

Samtempe kongresis blinduloj. En la enirhalo ni povis admiri foto-ekspozicion pri Kroatio: La lando de mirinda naturo.

Kanadaj samideanoj prezentis la venontan kongreson en Montrealo, al kiu jam aliĝis surloke 80 gesamideanoj, kio estas rekorda nombro.
La libroservo ofertis multajn librojn kaj aliajn esperantaĵojn. Okazis paroligaj lecionoj kaj konkurso pri publika parolado. Ne mankis aŭtoraj duonhoroj. Ĉiu kongresano ricevis la libron Kalevala - finna nacia epopeo. Ĝi estis donaco de la finnlanda E-asocio. Oni omaĝis la faman islandan verkiston Baldur Ragnarsson.
Kunvenis juristoj, fervojistoj, pedagogoj, mondcivitanoj, ĵurnalistoj, medicinistoj, nefumantoj, ekologiistoj, vegetaranoj, sennaciistoj, matematikistoj kaj aliaj homoj el diversaj organizaĵoj. Fondiĝis asocio de Te-amantoj. Futbal-matĉon ĉi-foje gajnis la esperantista teamo je 5:2.
Ĉiutage okazis ekskursoj tra la urbo kaj al proksima ĉirkaŭaĵo. La merkredaj tuttagaj ekskursoj ebligis al la kongresanoj viziti la ĉefurbon Helsinkon kaj Tampereon, kie okazis la UK antaŭ 24 jaroj.
La ĉi-jara internacia vespero estis brila. Ni spektis lumludadon, plurajn dancojn, kantojn, spritaĵojn. Ĉe la fino kantis la internacia koruso. La fermon de la kongreso efektivigis la nova prezidanto Charters Duncan. Oni dankis al la antaŭa estraro, kiu promesis kunlabori plu. Estis legata la rezolucio de la kongreso, surekrane aperis bondeziro de la sveda ministrino pri kulturo. Prezentiĝis la infanoj kaj adoleskantoj de la Kongreseto. Ĉe la fino estis transdonita la flago al la kanadaj kolegoj. Dankon al ĉiuj, kiuj

preparis la ĉi-jaran 104-an Esperanto-kongreson. L. Gabalda

Por ĉiu esperantisto estas honoro renkontiĝi kun Margaret Zaleski-Zamenhof, pranepino de la kreinto de Esperanto, sur la foto kun Jiří Caletka el Prago.

Antaŭ la fermo de nia Informilo ni ricevis ankoraŭ unu kontribuaĵon el la kongreso en Lahti kun la priskribo de la naturo kaj medio. Ni publikos ĝin venonte.

red.

SVEDA MINISTRINO SALUTIS LA KONGRESON EN FLUA ESPERANTO

Surpriza evento de la ferma ceremonio en la ĵus finiĝinta Universala kongreso estis la videa salutparolo de Amanda Lind, sveda ministrino pri kulturo kaj demokratio en flua Esperanto. Jen la teksto de ŝia alparolo:

Saluton estimataj kongresanoj! Mi estas Amanda Lind, sveda ministrino pri kulturo, sporto, demokratio kaj naciaj minoritatoj. Kiel ano de Miljöpartiet, la sveda verda partio kaj de la tutmonda verda movado, la vivanta naturo kaj floranta kulturo estas valoroj tre proksimaj al mia koro.

Elkoran bondeziron mi sendas al la Universala kongreso. Renkontiĝoj kaj babilado inter homoj estas fundamento por vigla demokrata evoluo. Dankon al vi ĉiuj en la Esperanta movado pro viaj kontribuoj por instigi komunikadon trans

lingvajn kaj naciajn limojn! Ni estu unu homaro sur ĉi unu terglobo. Amike Amanda Lind.

LA ESPERANTA KONFERENCO IEK

Dum la semajno – de la 13-a ĝis 20-a de julio 2019 ni pasigis tempon en Kondoros (Hungario) okaze de Esperanta konferenco IEK, kun la temo „Hungara kulturo“. Kondoros estas urba vilaĝo, tipa en hungara ebenaĵo sudoriente de Szolnok, en la regiono Békescsaba. La konferencon organizis Paŭlo Koĵuĥ, lokano (estro de la konferenco), tipa hungaro, agrabla kaj oferema.

Partoprenis fakuloj pri Esperanta literaturo el sep eŭropaj landoj kaj ĉinaj geedzoj. La nivelon de la prelegoj, precipe pri Hungario, ni aprezas alta: Jozefo Cseh, László Czilvaszi, Maria Boulton, Perla Mielo, J. Drahotová, M. Turková kaj aliaj. Ĝoje ni renkontis eĉ Judith Kovács, kiu vizitis en la jaro 2014 seminarion en Skokovy. Agrabla estis veturo en la ĉevalĉaroj tra la stratoj kaj vojoj, kiuj paralele kuras (laŭ formo de ŝaktabulo) en la urbo

inter belaj teretaĝaj dometoj kun multe da verdaĵoj kaj fruktarboj.

Du hungarajn filmojn ni spektis en E-lingvo. Per aŭtoj ni vizitis kelkajn proksimajn urbojn, en Békescsaba la domon, kie vivis la plej fama hungara pentristo (19a jc.) Munkácsy Mihály. Plene nin ekinteresis tajlorejo, kie oni kudras festajn vestaĵojn. Ili troviĝas en ĉiuj familioj; oni surportas ilin dum solenaj okazaĵoj. Ili (virinaj, viraj, por-infanaj) estas imitoj de la tradiciaj hungaraj kostumoj kaj vere aspektas nobelbunte.

Ofte ni trovis katolikan kaj protestantan preĝejon apud unu la alia. En Kondoros vivas maljuna lignoskulptisto, kiun ni vizitis en lia metiejo. Ni ĝojis, kiam ĉiuj esperantistoj tuj ekkonis „bravan soldaton Ŝvejk“.

La konferenco elektis por premio libron de la jaro „Nia diligenta kolegaro“ de Gorecka kaj Korĵenkov. Per trajno ni revenis en varmegan veteron al nia hejma lando.

Jindřiška Drahotová, Margit Turková.

NEVIDEBLA TRANSFUZO

Vera historio, kiel juna knabo enamiĝis reciproke al knabino. Okazis renkontiĝoj, la unuaj kisoj kaj post unu jaro ili geedziĝis. Tiam komenciĝis sanproblemoj de lia edzino – antaŭe sana persono. Simple aperadis seriozaj malsanoj unu post la alia. De la kuracisto al kliniko, de klinikoj al aliaj kuracistoj – ili estis devigitaj venki sanproblemon post sanproblemo.

La batalado daŭris 17 jarojn, kiam la edzino pripumpita de steroidoj forpasis, lasante al sia edzo du infanojn.
Li restis sola, sed ĉar lia amo al la edzino estis granda, li dediĉis la ceteron de sia vivo por trovi ŝian mortiginton. Dum la tempo li trastudis ĉiujn lernolibrojn pri tradicia medicino kaj ankaŭ ĉirkaŭ mil laboraĵojn el la tuta mondo, el plej grandaj universitatoj kaj fine li trovis la mortiginton.

Li nomis la fenomenon „nevidebla transfuzo“. En la trastuditaj lernolibroj por kuracistoj li trovis informojn kvazaŭ nevideblajn, sed tre gravajn. Ekzistas multe da malsanoj, kies kaŭzojn iluzie ne konas nia medicino – almenaŭ tiel oni opinias.

Anstataŭ tio li opinias, baze de la lernolibroj, ke hodiaŭ ni devas vivi en la marĉo de nescio. Laŭ li hodiaŭ estas bezonata la agnosko de nova paradigmo en medicino, ke ni homoj agas inter ni tokse. Imagu, ke akvo en la formo de vaporo ankaŭ estas nevidebla. Li asertas, ke homoj interŝanĝas

inter si antigenojn same kiel dum la transfuzo de la sango kaj ili eĉ ne scias pri tio. Tiamaniere ni ĉiuj influas nin reciproke.
Transfuzo estas komprenata kiel interŝanĝo de elementoj de la sango inter du individuoj (personoj). Tiel nomatajn sangogrupojn oni malkovris antaŭ cent jaroj. La sangogrupo karakteriziĝas per kunmeto de antigenoj ĉeestantaj sur sangoglobetoj. Antigeno estas difinita substanco, kiu simile kiel bakterioj, virusoj, parazitoj kaj fungoj povas nin mortigi. La rolo de antigeno estas elvoki imunoreagon de la organismo, alivorte – provoki la kreiĝon de antikorpoj. Dank' al tio ni povas defendi nin kontraŭ malsano.

Se dum transfuzo oni uzos malĝustan sangogrupon, la ricevanto povas morti. Ekzistas nur du antigenoj utilaj por nia sango: A kaj B. Tamen ekzistas kvar sangogrupoj A (havanta la antigenon A), B (havanta la antigenon B), AB (havanta ambaŭ antigenojn) kaj 0 (havanta neniun el la antigenoj). Estas tiel, ke la elementoj de la sango estas ne nur ene de la sangovaskuloj. La elementoj de la sango troviĝas ankaŭ ekster la sangovaskuloj – ili troviĝas en ĉiuj niaj sekrecioj kiel salivo, ŝvito, muko, larmoj, en ĉio, kion ni sekrecias eksteren.

La scio estas konata de 150 jaroj, tamen nuntempe ĝi fariĝis nevidebla. La scio estas tre ŝoka por plimulto el ni. Imagu nome, ke iu virino iras al kuracisto kun la virina problemo, kie ŝi ekscias, ke ŝi havas la problemon ekz. danke al sia edzo aŭ lita partnero. Interesa novaĵo, ĉu ne? Alikaze kiel diri al la patrino de trimonata infano: „Ne tuŝu vian fileton, ĉar vi havas antigenojn en via ŝvito, kiuj iritas lian haŭton." „Sinjoro doktoro, mi ja amas mian infanon!" — ŝi respondus certe. Tiam la kuracisto diros: „Jes, vi naskis lin, sed li heredis la antigenojn de sia patro".

Antigenoj estas kelkfoje tre toksa armilo – tekstas la konkludo de nia esploristo. Li spertis tion je si mem, paginte per la suferoj kaj perdo de la amata edzino. Li opinias, ke la problemo estas, ke bakteriologoj, virusologoj, hematologoj kaj serologoj okupiĝas nur pri sia branĉo. Tial la nevidebla transfuzo plu restas la problemo de pluraj el ni (laŭ Emil Piasecki – Malharmonio serologia).

Andreo Bach el Gdynia en Pollando

(Antigeno estas materialo kaŭzanta specifikan imunan reakcion, ekzemple eliminadon de kontraŭrimedoj).

LA VIVTRAGEDIO DE LA VERKISTO RUDOLF TĚSNOHLÍDEK

Kiam dum la tagmeza paŭzo la 12. 1. 1928 eksplodis ekpafo en la redakcio de *Popola ĵurnalo*, en la ejo estis neniu alia krom la sinmortiginto.

Ĉiuj antaŭe foriris tagmanĝi. Reveninte ili trovis la malfeliĉulon en flako de sango, sed li ankoraŭ ne estis morta. “Mi malbone celis“ li flustris, kiam li estis forportata en ambulanc-aŭton. Sed tuj post alveno en hospitalon li mortis. Kiam pri tio estis informita lia edzino, ŝi ankoraŭ en la sama tago sekvis lin – ŝi malfermis gason al si.

Post kvin tagoj, la 17-an de januaro 1928 estis ambaŭ simplaj nigraj ĉerkoj kremaciitaj; la mortajn geedzojn adiaŭis nur la literaturistoj Eduard Bass kaj la doktoro Albert Pražák.

La viro Rudolf Těsnohlídek, felietonisto kaj eminenta Sokol-gimnastikisto estis ankaŭ la malkovrinto de la Demänova kaverno, kaj fondinto de la kristnaskaj arboj sur la placoj de ĉeĥaj urboj. El la plimulto de lia agado restis en la memoro ĉefe nur lia lirika rakonto „La vulpo Bystrouška“, al kiu la belan muzikon aldonis la muzikkomponisto Leoš Janáček.

La vivtragedio de Rudolf Těsnohlídek havis la tutan vicon de animtraŭmoj, kiuj lin renkontis kaj akompanis. Unu el la unuaj estis morto de lia kunlernanto el la gimnazio, kiu dronmortis antaŭ liaj okuloj kaj Rudolf nerve preskaŭ ŝtoniĝis kaj ne estis kapabla helpi al li. Poste dum studado en praga universitato li edziĝis al Jindra Kopecká, knabino, kiu estis morte malsana pere de tuberkulozo kaj Rudolf tre amis ŝin. Dum la edziĝvojaĝo en Norvegio, kelkajn tagojn post la geedziĝo ŝi sinmortigis. Post la reveno hejmen li transloĝiĝis el Prago, kie ĉio memorigis lin pri la amata edzino.

Li trovis okupon en Brno ĉe *Popola-ĵurnalo*, kie li laboris ĝis sia morto. Post ia tempo li trovis la duan virinon, sed la kunvivo ne funkciis kaj baldaŭ ili disiris.

Nur en la jaro 1924 la tria virino Olga Vasická estis lia apogo ĝis la morto en la tempo de liaj psiĥaj problemoj, depresioj, halucinoj kaj vizioj.

Ne ĉiu vivo estas „promeno tra la roza ĝardeno“.

Miroslav Klimpl

Dimanĉe, la 22-an de septembro 2019 en Pardubice

Ĉu vi ne forgesis, ke ni ĝojatendas vin en nia renkontiĝo okaze de la 110-jara ekzistado de nia Esperanto-klubo en Pardubice kaj la 100-a mortdatreveno de MUDro Stanislav Schulhof? Ni ĝojos, kiam vi konfirmos vian ĉeeston, por ke ni povu mendi vian tagmanĝon. red.

Trista informo:

La 3-an de aŭgusto 2019 mortis en la dormo **Ivana Knížková** (68j.), la filino de Milada Hemerková, kiu estis eksgvidantino de la E-klubo Dukla Pardubice. Honoron al ŝia memoro! red.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.